Sukcesa Esperanto-kurso en Munkeno

Je la semajnfino 9.2./10.2.2008 la Munkenanoj organizis dutagan kurson en la EineWeltHaus (unu-mondo-domo).

Zsófia Kóródy (en la mezo) kun parto de la lernantoj en Munkeno. F: Karl Breuninger

Partoprenis 12 interesuloj, kiuj ĝis tiam sciis preskaŭ nenion pri Esperanto. La taskon de instruado transprenis Zsófia Kóródy el Herzberg. Ŝi hazarde traveturis je tiu semajnfino Munkenon, kaj ni kaptis la ŝancon prezenti spertan instruistinon. Ŝi entuziasmigis la interesulojn tiel bone, ke tuj kvar membriĝis en nia klubo. Ili tiel interalie ŝparis la kurskotizojn. Zsófia Kóródy ankaŭ estis intervjuita de televidteamo kaj la filmeton vi povis rigardi je la 17a de februaro en ARD. La fundamento de tiu neatendita intereso pri la kurso estis informvespero komence de januaro en la popolaltlernejo en Munkeno. Tien venis preskaŭ 15 personoj, kiuj eĉ devis pagi 5 eŭrojn por la tre bona informado de nia nova aktivulo Norbert Gütter. Li dum preskaŭ unu jaro diskutis kun la prizorgantino de la popolaltlernejo kaj nun ŝi ŝajne estas konvinkita kaj estas malferma por la planado de nova informado-vespero. *Karl Breuninger*

Sprachklub Augsburg in neuen Räumen

Ab Juni 2008 trifft sich der Esperanto-Sprachklub Augsburg im „Bürgertreff Hochzoll“, Neuschwansteinstraße 23, jeden 1. Mittwoch im Monat ab 17 Uhr. Am 4. Juni steht „100 Jahre Deutsches Esperanto-Institut – neue Initiativen“, am 7. Juli ein „Senkrokodila vespero“ mit Sprachübungen auf dem Programm. Für das Dachterrassenfest am 26. Juli wird um Anmeldung gebeten.

Steffi kaj Ĝeraldo Tucker

Federacia Meritkruco por prof. Rokuro Makabe

Germana Esperanto-Asocio (GEA) fieras pro sia membro prof. d-ro Rokuro Makabe el Dreieich, aktivulo de la Esperanto-Societo Frankfurt/Main, kiu ricevis la 26an de februaro la Federacian Meritkrucon.

Transdonis ĝin la Heslanda ministro por Federaciaj kaj Eŭropaj Aferoj, Volker Hoff.

VERLEIHUNGSURKUNDE

BESONDEREN VERDIENSTE

PROFESSOR DR. MED. ROKURO MAKABE

DAS VERDIENSTKREUZ

AM BANDE

Prof. Makabe lernis Esperanton jam en 1950 kiel junulo kaj aliĝis al GEA en 1983. Tial GEA krome kore gratulas al li ankaŭ pro la 25-jara jubileo de lia membriĝo kaj deziras al li ankoraŭ multajn jarojn en sano kaj kontento.

Rudolf Fischer

Norbert Karbe laŭreato

Dum solena akcepto ĉe urbestro de Pirna la 4an de januaro 2008 Norbert Karbe iĝis laŭreato pri honorofica kultura laboro pro siaj Esperanto-aktivecoj dum jardekoj kaj kunlaboro kun aliaj regionaj kulturaj organizaĵoj. Kelkaj regionaj gazetoj tiamaniere menciis la centjaran Esperanto-movadon en Pirna.

Frank Nitzsche

Peter Roether mortis

Je la 2a de februaro mortis en Michelstadt en la aĝo de 83 jaroj nia kara membro Peter Roether. Li estis pranepo de la konata Esperanto-pioniro Marie Hankel; tamen Peter Roether ne eestis denaskulo. Li lernis la internacian lingvon ĉirkaŭ la jaro 1970, kune kun sia plej aĝa filo Christof.

Poste li tre aktivis en la movado. Li estis interalie membro de GEA kaj de UEA kaj prezidanto de Romolo. En la jaro 1987 li kunfondis la Esperanto-klubon Odenwald (EKO). Peter Roether partoprenis plurajn Universalajn Kongresojn, ekzemple en Hamburgo, Pekino, Berlino, Antverpeno kaj Zagrebo, kaj nenombreblajn aliajn kongresojn. Estante instruisto, li organizis multajn Esperanto-kursojn.

Kun Peter Roether ni perdas tre karan movadanon, kiu estos eterne rememorata. Ni funebras kaj kondolencas.

Andreas Emmerich
prezidanto de EKO

REVELO-tago en Krefeld

Je la 6a de septembro okazos la REVELO-tago en Krefeld. Krom kutima membrokunveno estos muzik-prezento kaj festo okaze de la 100jariĝo de la Esperanto-grupo. Detala programo sekvos en venonta *Esperanto aktuell*.

Petra Dückershoff

Kiel travivi intervjuojn?

REVELO (Rejnland-Vestfalia Esperanto-Ligo) organizis en februaro seminarion rilate al la temo „Informado/publika agado“ en Essen. Gvidis ĝin d-ro Ziko van Dijk, kiu jam multe okupiĝis pri tiu temo kaj i. a. pasintjare publikigis libron pri ĝi. La ĉefa temo estis “kontakto kun ĵurnalistoj”. Multaj aktivuloj jam konas tiun situacion, kiu foje ne estas tute agrabla kaj certe ne kutima. La partoprenintoj ekzercis intervjuojn en kiuj kelkaj rolis kiel ĵurnalistoj, krome oni priparolis la varbadon ĉe informstandoj, la preparon de komunikiloj kaj artikoloj por gazetoj kaj interŝanĝis spertojn kaj opiniojn.

Petra Dückershoff